

**Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 2-a de septembro 2019**

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Dror Gaon, Matilda Landaŭ, Gabi Zeevi (ĝis 20:20).
Gastoj: Amos Ŝapira, Avigail Meŝulam.

Protokolo de la pasinta kunsido estas en la retejo

<http://esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP201907.pdf>

1. Raportoj

- a) ELI en la UK kaj BET: Amri varbis por la 21-a IK, en la UK reprezentis ELI en la Movada Foiro kaj en la Komitato.
- b) Amri intervjuiĝis la 26.7-an vendrede matene en "Reŝet Bet" – "אמילי והפרופסור" (Emily Amrusi kaj Yuval Elbaŝan).
- c) La Somerfina Renkontiĝo – okazis la 26.8-an en kafejo Alternativ, kun ĉ. 30 personoj.

2. IEK-21 (Amri)

- a) Por 2020 estis decidite pri Tel-Avivo ("Bnej Dan") – Nava rezervis 10 ĉambrojn. Unua antaŭpago: 20% – 2,720 NIS, pagita de Ŝlomo per banka transpago. La dua antaŭpago de 4,080 NIS – pagenda ĝis 20.2.2020. [Laŭ peto de Amri, Nava aldonis 5 ĉambrojn kaj unu nokton].
- b) La kosto por paro por du noktoj: 1,360 NIS, kun vespermanĝo: 1,496 NIS. Krome estos pago por la programo – 150 NIS, rabato ĝis 1.1.2020. Same por la eksterlandanoj.
- c) La datoj – 2-5.4.2020 (4 tagoj kaj 3 noktoj, jaŭde-dimanĉe. Eblas ankaŭ nur ĝis sabato).
- ĉ) Amri varbis dum BET kaj la UK. Rezulte venos la Ukraina Grupo (5), Bronŝtejn kaj Zuzanna. Ĉiuj proprakoste, krom Nataŝa kaj Bronŝtejn, por kiuj ELI pagos la loĝadon. Multaj pliaj esprimis interesiĝon; ni devas fiksi prezon kaj pretigi la Unuan Informilon.
- d) Hazarde Amri malkovris, ke la 13-a MK en Turkio kolizias kun la IEK, kaj li petis de la organizantoj movi ĝin unu semajnon pli frue. Jam movita (baldaŭ venos oficiala informo).
- e) Ĉar la MK kaj la IK okazos en sinsekvaj semajnfinoj, oni povas reklami al eksterlandanoj kombini la du, kaj kunlabore plani post-MK kaj antaŭ-IK-ekskursojn.
- f) Jael faris afiŝon (jam en la retejo) kaj nomŝildojn.

3. Oficejo (Ŝlomo)

- a. Daŭre estas ebleco en WE (oficejo 7 m², kunsideo – 35 m², neta prezo 340,000 NIS).
- b. La vendanto Avihai premis ke ni subskribu en julio – Amri rifuzis pro la alta prezo.
- c. Poste Avihai ne rekontaktis adv. Modan. Modan suspektas, ke li ne povas garantii nian uzadon de la kunsideo.



4. Dratverejo (Jehoŝua, Ŝlomo)

- a) La perdoj de ELI jam superas 30,000 NIS.
- b) Komence de aŭgusto Ŝlomo registris en la kortumo la evaku-ordonon (צו פינוי).
- c) Finfine sukcesis la provoj malkonekti la elektron. Sekve, la luanto ŝanĝis la nomon en la elektrokompagnio kaj pagis la elektro-ŝuldojn, kaj la elektro estis tuj rekonektita.
- ĉ) En julio Ŝlomo registris la nepagitajn ĉekojn per la Ekzekucia Instanco (הוצאה לפועל).
- d) Amos iris tien por doni la leteron pri evakuado, trovis ilin hejme, kaj Dima (la luanto) subskribis pri ricevo. Li diris, ke eble li trovos la monon repagi (אשרי המאמין).

5. Financoj (Ŝlomo)

- a) Ŝlomo respondis al la Registristo – ŝajne nun ĉio enordas.
- b) Ŝlomo sendis la finanĉan raporton pri 2018.
- c) Pro la kotizreformo de UEA Jehoŝua apenaŭ kolektis la ELI-kotizojn. Ŝlomo pretas enkasigi la membrokotizojn, kiel praktike tion fari? (poŝte, telefone, dum la LK...).
- ĉ) Duona 2019 buĝeto kaj efektivigo: Estas deficito de 28,000 NIS kompare kun la prognozo, pro la luo-nepago. Pozitiva rezulto estas, ke la Israela Kongreso kaj postkongreso ne perdis.
- d) Investoj – Ŝlomo proponis investi en BTB – kun ĉ. 5% jara profito. 1.25% por makleraĵo kaj sekureco-fonduso. **Decido:** *Ŝlomo investu duonon en TBT. La alian duonon - li konsultu kun Eran kaj estas komisiita investi en alia kanalo.*

6. Israela E-isto (Mikaelo kaj Amri)

- a) IE-167 estas enretigita.
- b) Mikaelo kaj Lea dissendis IE-167+166. Kostis pli ol kutime, verŝajne ĉar superis 100 g.
- c) Amri kunportis al BET kovertojn kun IE-166+167. Mikaelo disdonis 60 ekzemplerojn.
- ĉ) Jehoŝua trakribis la adresaron, kaj forstrekis multajn nepagintajn abonantojn.
- d) Mikaelo petis liberiĝi de la poŝta sendado pro lingvaj malfacilaĵoj. Amri pretas plufari, se Mikaelo pretigos la kovertojn.
- e) Mikaelo pretigos IE-168 ĝis la 20-a de oktobro. Tiam li estos unu monaton en Ukrainio.

7. Kurso(j)

- a) Dror: E-kurso estas la “raison d’etre” de ELI, ni laŭeble nepre okazigu.
- b) Kiu instruu? Ni ne povas kalkuli je Doron. Amri kontaktos Eldad kaj Amir por demandi, ĉu Eldad pretas, kaj ĉu Amir havas kandidatojn. La pago al la instruisto venos nur de la kotizoj, laŭ la decido en julio. [Amri jam kontaktis. Eldad pretas, Amir havas iomete. Nesesas reklami.]



8. La kotizreformo de UEA (Jehoŝua, Amri)

- a) Malgraŭ la granda plialtigo de UEA-membrokotizoj por Israelo, Jehoŝua sukcesis remembrigi al UEA ĉiujn delegitojn, per subteno el Fondaĵo Canuto laŭ la 4-a, anstataŭ la 5-a Kategorio.
- b) Sume: en 2019 estas 38 IM-j, kompare kun 50 en 2018 (el ili 8 DM).
- c) Amri sendis mesaĝon pri tio al la nova estraro de UEA.

9. Prezidanteco de ELI

Amri anoncas ke pro lia nova respondeco kiel estrarano de UEA, kaj ĉar jam pli ol dek jarojn li plenumas la taskon, li ne rekandidatiĝos venotjare.

La venonta kunsido: 7-a de oktobro 2019, 19:30

Protokolis: Amri Wandel